kontoj. En sep urboj — *Karlovy, Vary, Praha, Hradec Kralove, Brno, Trebic, Tabor kaj Plzen* — ni estis la gastoj de la lokaj grupoj kaj kelkloke eĉ estis akceptataj de la urbestroj. Ni vidis i.a. la rokaron de Prachov kaj la grotojn kaj abismon « Macocha »; grimpis sur elhakitaj ŝtuparoj, tra fendoj kaj inter vertikalaĵoj rokandoj. En la ĉirkaŭaĵoj de Tabor, kie iam loĝis Jan Hus, ni ĝuis la ĉarmon de trankvila promenado sur la arbkovrita bordo de *Luznice*. En la kontrastplena vojaĝo ni trovis tie agrablajn ripozejon inter la pompa « ora » urbo Praha, la luksa banloko *Karlovy Vary* kaj la fabrikurbo *Plzen*. En *Lany* ni vizitis i.a. la tombon de *Masaryk*. Post vizito al la iama vilaĝo *Lidice*, tute forbruligita kaj senhomigita de la germanoj, kie nur kruco kaj malgranda muzeo atestas pri la nenigemo, ni admiris la modernajn domojn, en kiuj loĝas la laboristinoj de la Bata-fabriko en *Trebic*. Mi povus rakonti multon pli. La urbo Praha meritas tutan artikolon pro sia rava situo kaj multaj imponaj konstruaĵoj. Kiom ni ĝuis, dank' al la aranĝoj de s-ro Vitek, kiu bonege preparis la vojaĝon ! Ni konatigis kun multaj ĉeĥaj esperantistoj, kies gepatra lingvo estis absolute nekomprenebla al ni, sed en kiuj ni trovis spiriton parenan al la nia, kaj kiuj estis efektive niaj samideanoj. Ili havas, kiel diris unu el niaj karavananoj, ne nur oran urbon, sed ankaŭ oran koron. A. J. Middelkoop.

USONA INSTRUISTA ASOCIO ELDONIS BROŝURON PRI ESPERANTO

La Nacia Eduka Asocio de Usono, kiu havas 441,127 membrojn kaj estas la plej granda instruista asocio de Ameriko, ĵus eldonis 16-paĝan broŝureton pri E. en famkonata serio pri memklerigo (Personal Growth Leaflets). Ĝi presigis 20.000 ekzemplerojn kaj intencas presigi pli grandan nombron. La nomo de la broŝuro estas « Esperanto — The World Interlanguage » (Esperanto-La Tutmonda Interlingvo). Ĝin preparis la E.-Asocio de Nord-Ameriko.

La broŝuroj de la serio, en kiu la nova libreto estas N-ro 183, estas amase disvastigataj. Multaj instruistoj kaj aliaj aĉetas la tutan serion. Estonte ili do povos tiamaniere ankaŭ ricevi fidindajn informojn pri E., ĝia neceseco, ĝia gramatiko, ĝiaj praktikaj uzoj, ĝia utileco en la lernejoj, ktp. La broŝuro ankaŭ enhavas simplan tekston unupaĝan en E. kaj informojn pri EANA kaj lernolibroj.

La Nacia Eduka Asocio havas sian Centran Oficejon en Washington. La Oficejo estas samtempe la Sekretariejo de la Tutmonda Organizo de la Instruista Profesio.

La broŝuro kostas nur unu cendon kaj do povos esti uzata por grandskala propagando en Usono, Kanado kaj aliaj anglalingvaj landoj.

ANONCETOJ

Ĉeĥa studento, Oldrich Schwetter, Bratislavska 5 Breclav, Ĉsl., 23-jara, deziras korespondi kun samideano(in)o pri korpdukado kaj aliaj temoj.

S-ro Zapert Zbigniem, Witkiewicza 29 m2 Varsovio, deziras korespondi kun geskoltoj kaj interŝangi il. pk.

Policistoj en Hamburg deziras korespondi kun samfakuloj. Oni skribu al s-ro A. Weide, Viktoriastrasse 55, I, Hamburg-Altona.

Deziras korespondi kun Esperantistoj, pri ĝenerala kulturo : Y. NAKAMURA, 20-jara Kawabata-Malji, 77 — Kanazawa-Shi. Japanujo.

Goossens Victor, Bosstr. 22 Onkerzele serĉas laboron. Parolas nederlande, france, angle, germane, hispane, sekvis la lecionojn de « Institut National de Comptabilité ». Samideanoj uzu liajn servojn.

Al ges-roj Ter Braake en Haarlem naskiĝis filo Jan Willem. Niajn korajn gratulojn al la gepatroj kaj koran bonvenon al Jan Willem !

FL. L. E.

Nova jaro, novaj planoj ! Kaj pli ĝoja ol iam aspektas 1950 por nia enlanda movado. Sanaj financoj ebligas al ni dediĉi pli da tempo, pli da mono al la propagando ĉe la oficialaj instancoj kaj en la lernejoj. Nia aro ankoraŭ ne estas sufiĉe granda ; tamen ne nur gravas la kvanto, sed ĉefe la kapablaj kunlaborantoj ! Ni ja scias ke kelkaj talentaj Esperantistoj distingiĝis en lokaj aranĝoj : ni insiste petas ke ili partoprenu la ĝeneralan jarkunvenon, ke ili ensendu artikolojn por F.E. kaj sugestu bonajn ideojn al la sekretariejo.

Nia Ligo estas juna ; ni fieras pro tio, sed precize tial trudiĝas al ni devoj : aktiveco kaj energio !

Tun aferon ni volus pritrakti en ĉi tiu rubriko, komence de nova varbo-sezono. Membroj ofte riproĉas ke *Flandra Esperantisto* estas relative multekosta. Ĉu ili scias ke ĝia eldonkvanto ne sufiĉe kreskas kaj ke presado je tiu prezo postulas neimageblan malŝparemon kaj senĉesan inventemon ? Kaj ĉu ili ne forgesas ke temas ne nur pri la gazeto mem, sed ankaŭ pri aliaj administraj elspezoj, pri la membrigo al UEA kaj tiel plu ?

Sendube la varbokunurso 1949 rezultigis seriozan progreson kaj ni sekrete esperas ke la konkurso 1950 superos ĉiajn atendojn ; tial ni ellaboris premisistemon, submetotan al la ĝenerala jarkunveno.

De la venontaj monatoj dependos la kresko de F.E. kaj de nia Ligo. Idealiste kaj entuziasme akceptu la tiurilatajn proponojn de la Ligestraro. Se jes, ni espereble sukcesos. Ĉar ja okazu ĝenerala ofensivo por la ada disvolvado de la Ligo kaj por la fortikigo de la enlanda movado !

Ni cetere ja rajtas malkaŝi ke la Ligestrara kunsido 25-9 zorge ekzamenis nian situacion kaj malgraŭ la valorperdo de nia franko neniel ŝanĝis la kotizojn 1950 ; ni decidis pri la junularproblemo (vidu sube la skizitan ege favoran aranĝon !), esploris la rezultojn de la koresponda kurso, de la pasinta varbokunurso, ktp.

Ni do nepre insistas ke vi tuj kaj vigle komencu la varbadon de membroj kaj amikoj por 1950. Jen, memorige, la kotizoj :

- Membroj VEB : 75 Fr.
- Enloĝantaj membroj (kun *De Esperantist*) 25 Fr.
- Subtenantoj membroj : min. 150 Fr.
- Amikoj 15 Fr.
- Amikoj (kun *De Esperantist*) 25 Fr.
- Junuloj, ĝis 18-jaroj (kun *Flandra Esperantisto* kaj *La Juna Vivo*) 50 Fr.
- Junuloj, ĝis 21 jaroj : (Flandra E-isto) 50 Fr.

Statuta Ĝenerala Juarkunveno

Bruselo, dimanĉo la 6.11.1949. Ĉiuj liganoj kaj precipe la ligaj aŭ sekciaj estraranoj kaj la reprezentantoj estas petataj ĉeesti tiun gravan kunsidon.

Ni insistas por ke kiel eble plej multaj liganoj partoprenu, ĉar de iliaj decidoj parte dependas nia agado dum 1950.

La ejo estas la *Kutima*, « Vlaamse Club », E. Jacquainlaan, 121, je la 14-a horo precize. Kompreneble, F.E.I. organizos libro-ekspozicion.

TAGORDO

1. Malfermo
2. Financa Raporto
3. Sekretaria raporto
4. Kotizoj 1950
5. Bilanco kongreso 1949
6. Junular-problemo
7. Varbokunurso
8. Koresponda-kurso
9. Nia Pozicio
10. U.E.A.-raporto
11. Ekŝigo de 7 estraranoj kaj elektado (art. 21 O.R.)
12. Diversaĵoj.

Universala Esperanto-Asocio.

Na de jongste aanpassing van de wis-selkoers werden de verminderde bijdragen voor individueel lidmaatschap voor 1950 aldus vastgesteld :

- M.J. (met jaarboek) : 35 B.fr.
- MA. (met jaarboek en tijdschrift Esperanto) : 90 B.fr.
- MS. (steunend lid met jaarboek en tijdschrift) : 180 B.fr.
- Patrono : 900 B.fr.

Vlaamse Esperantisten, *Steunt de Internationale Esperanto-Vereniging door uw individuele aansluiting, Hernieuwt zo vroeg mogelijk uw lidmaatschap om vertraging in het toezenden te voorkomen, Stort uw bijdrage op postchecknummer 4161.35, Fr. Couwenberg, Blankenberge.*

De Vicefdelegito voor België.

« HOGER OP »

Zoals aangekondigd, vond op 22 September j.l. en vereerd door de aanwezigheid van de Heer Alb. Bas, algemene Bestuurder der Postchecks, de bijeenkomst plaats van Hoger Op, Vlaams Gezelschap van het Personeel der Postchecks tot bevordering van taal, kunst en vriendschap. In zijne feestzaal ving de culturele actie aan met een voordracht over Esperanto, de wereldtaal : overtuigend werd dit onderwerp door dhr A. De Keyzer de verdienstelijke Voorzitter Hoger Op, en Penningmeester V.E.B., ontwikkeld voor een aandachtig publiek (ongeveer 125 personen). Daarna werd volgens de Cseh-methode, een proefles over Esperanto gegeven door dhr Alfr. Ledeganck, achterkleinzoon van de Vlaamse dichter K. L. Ledeganck, die directeur is geweest van een taalschool in Roemenië en, gehuwd met een Roemeense, uit dat land teruggekeerd in Mei j.l.

Deze proefles genoot een overgroot succes, zodat niet minder dan 20 aanwezigen zich aanmeldden voor een Esperanto-cursus, die van 4 October af doorgaat, zoals elders gemeld, in de Vlaamse Club.

Na die les werden de aanwezigen vergest op enkele Vlaamse liederen, door het kleine orkest Hoger Op uitgevoerd.

Ook de boeken-tentoonstelling, verzorgt door dhr E. Cortvriendt, Directeur van V.E.I., genoot belangstelling en bijval.

Beslist verdient Hoger Op de sympathie en de gelukwensen, niet enkel van alle weldenkende Vlamingen, maar tevens van alle Vlaamse Esperantisten !

Wie volgt het verdienstelijke voorbeeld ?

De Redactie.

V.E.B. — *Afdeling Blankenberge* : Begijn Juli kwam de groep, niettegenstaande de zomerdrukke, bijeen om onze ijverige schatbewaarster Juf. M. Van Mullem, vereerd met het Burgerkruis 1e Klasse, te huldigen. Op 21 September j.l. werd onze verdienstelijke Voorzitter, de heer F. Couwenberg, gevierd ter gelegenheid van zijn benoeming tot Ridder in de Leopoldsorde, tijdens een gezellig samenzijn, waarbij ook de heer J. W. Chambers L.K.K.-Voorzitter van het Congres te Bournemouth als gast aanwezig was. Op 28 Sept. werden de welkijkse vergaderingen hervat.

GVIDLIBRO PRI PARIZO. 62 ilustritaj paĝoj kaj unu elfaldebla mapo. Eldonis : Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 30 bfr. ĉe F.E.I., Brussel.

Eldonita okaze de la 22-a kongreso de S.A.T. la bone kaj sur bela papero (en Danlando !) presita plaĉa broŝuro sub kolora kovrilo prezentas enkondukon (Parizo, nia vilaĝo), indokson de vidindaĵoj kaj kuriozaĵoj, naŭ tipajn promonadojn, klarigojn pri vizitindaĵoj kaj mapon de la franca ĉefurbo, kosmopolita metropolo kun tri milionoj da enloĝantoj, abundaj monumentoj, muzeoj kaj parkoj.

Kontrolita de la « Literaturo Komitato de S.A.T. » Ni renkontis en la teksto la strangajn k(kaj) kaj la fonetikan transskribon de la propraj nomoj kiu antaŭas la originalan skribmanieron : Perlaŝez (Père Lachaise).

Esperantisto vizitonta la francan ĉefurbon nepre aĉetu la bonvenan broŝuron, kiu sendube jam utilis al multaj kongresanoj de S.A.T., kaj certe utilis al la venontaj partoprenantoj de nia Universala Kongreso. E.C.

J. B. VAN AS †

La 25-an de aŭgusto mortis, 73-jara, en Antwerpen, la kasisto de nia antverpena sekcio. Jam de 1923, li fariĝis vigla, propagandema kaj fidela samideano kaj anigis al nia sekcio en 1934. De tiam li multajn jarojn, same akurate, regule kaj fervore funkciis. Lia foresto sendube estos por la sekcio kaj por liaj amikoj ega manko. Li ĉeestis plurajn internaciajn kongresojn (Kolonjo, Stokholmo, Krakovo, Londono kaj Berno).

Ni sincere kondolencas la afliktitajn edzinojn kaj parencojn.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

Akiras PREMION post n-roj 67-68 : F-ino M. Van Mullem, el Blankenberge. (Fl.L.E.) kaj H. Arends el Arnhem (LEEN).

SOLVOJ.

N-ro 69. *Horiz.* 1. psalm. 2. incit ; aorto. 3. ru ; kankr ; et. 5. aln ; alg. 6. ĝendarm. 7. blek ; ebla. 8. leg ; sku. 9. aĵ ; slipo ; ni. 10. kanto ; insul. 11. in ; ironi ; bo. — *Vert.* 1. ĉirkaŭbraki. 2. nu ; dan. 3. anĝel. 4. pik ; ekesti. 5. stamen ; glor. 7. lakona ; spin. 8. mor ; rekoni. 9. bambu. 10. te ; nub. 11. fotografilo.

N-ro 70. sakso-fono ; tro-feo ; eks-tra ; lino-tipo ; loko-motivo ; astro-logo ; nokto-mezo ; ega-ligi ; ne-vino ; garni-turo ; hoko-ŝnuro ; ono-briko ; legi-timi ; mono-polo. Stellan Engholm.

N-ro 71 : *Sanĝ-enigmo*

Trovu kvarliterajn radikojn respondantajn al la donitaj indikoj, laŭ jena procedo : forigu unu literon el la unua vorto, aliordigu la aliajn kaj aldonu novan por formi la duan vorton, k.t.p., ĝis sub 20 vi retrovos la saman vorton kiel sub 1.

1. ĝi brilas dumnokte ; 2. ujo, ofte ligna ; 3. difinita laboro ; 4. eltiri herbaĉojn en ĝardeno ; 5. brui kiel malnova plumo ĉe skribado ; 6. trovebla ĉe bovo ; 7. ĝi gruntas ; 8. nigra birdo ; 9. skribi libron ; 10. ĝi troviĝas en pruno, persiko ; 11. tiri post si ; 12. birdo ĝin havas ; 13. senti bedaŭron post farita kulpo ; 14. ĝi ebligas transiron de rivero ; 15. pleniĝi truon ; 16. konduki brutojn sur kampojn por ke ili manĝu herbon ; 17. subtere vivanta mambesto ; 18. malmola, fleksebla metalo ; 19. kaŝe proprigi al si posedaĵon de iu alia ; 20. kiel 1.

N-ro 72 : KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. apliki forton sur iun korpon por malvastigi la spacon okupitan de ĝi (R) ; regno regata de reĝo aŭ imperiestro. (R). 2. sidejo de pasio (R) ; ne pli ol ; frakcio (R). 3. parazito vivanta en homo aŭ besto (R) ; havanta multajn erojn en malgranda volumeno (R). 4. kuniĝo de aro da homoj por komuna celo (R) ; prepozicio ; interjekcio esprimanta malestimon. 5. azia lando (R) ; konjunkcio ; prefikso. 6. neakompanata (R) ; transmeti agon al pli malfrua tem-

po (R). 7. koko ĝin havas (R) ; koloro (R). 8. posteulo (R) ; sudlanda frukto (R). 9. ĝi estas travidebla (R) ; sekve. 10. Tuto de la procedoj per kiuj homoj kredas povi interrilati kun supernaturaj estuloj (R) ; legomo (R). 11. ĉirkaŭaĵo en kiu vivas in estaĵo (R) ; trempi por lavi (R). 12. manlabora profesio (R) ; flankelasi (R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Vertikale. 1. parazita insekto (R) ; rapida desegno prezentanta nur ĉefajn liniojn (R) ; sufikso (R). 2. sameco de opinioj inter pluraj personoj (R). 3. komenciĝi (R) ; fiŝo (R) ; aermovo (R). 4. maŝino, kiu produktas movon (R) ; karakteriza persona maniero esprimi siajn pensojn (R). 5. ĝi instruas kiel oni preparu manĝaĵon (R) ; konsideri ion malbonan kiel baldaŭ okazontan (R). 6. persona pronomo ; muzikilo (R). 7. persona pronomo ; modere manĝanta kaj trinkanta (R) ; pensajo (R). 8. interjekcio ; laŭte prononci kun artisma tono (R) ; fari (R). 9. longkrura birdo (R) ; saltanta besteto (R). 10. sin nutri (R) ; fari kion alia persono ordonas, ke oni faru (R). 11. forpreni de iu laŭ rajtigita aŭtoritato ion malpermesitan (R) ; ludilo (R). 12. persisti ĉe sia postulo (R) ; unuo de valoro ĉe ludoj (R).

La solvojn sendu Flandra Ligo al *Postbus 342 (Enigmoj)*, Brussel kaj la nederlandanoj al *S-ro Teunissen, Legmeerst. 37.A.1., Amsterdam-West*, antaŭ la 20-10-1949.

La Poeto sen Koro

verkis : E. Van der Hallen
el la flandra : Dirk.

Mi volas rakonti pri juna feliĉa poeto, en la jaroj kiam la junaj poetoj kutime kredas ke la vivo estas ununura ravego kaj ke, ĉirkaŭ ili, la homoj estas ĉiuj senesepte bonaj — krom unu, ĉar la junulino, kiun ili amas ja ĉiam nekoncepteble superas la komunan homan skalon.

Ami unu la alian, junaj amikoj, estas ĉion akcepti de unu homo kaj esti, sub ĉiuj cirkonstancoj, preta rezigni kion oni posedas aŭ deziras, kiam la alia volas tion : kune deziri, pensi, senti, malaprobi kaj ade deziri kuneston por trairi la vivon en ĝiaj doloro kaj ĝojo.

Tiel statis mia poeto kaj, krome, la junulino, kiun li amis estis juna, bela kaj fiera. Fakte mi nepre scias kiom estas grave, kiam poeto tiel ekscese amas junulinon sed, ĉion konsiderante, mi kredas ke eĉ la plej alta prezo ne estas tro multkosta por la amo de poeto.

Sunaĵ, gajhoraj estis tiuj tagoj por ambaŭ ; en la imago de la junulino, la poeto portis rozokronon kaj la vortoj, kiujn li diris, ŝajnis al ŝi poezie helaj kaj profundaj. Horoj ravoplenaj, kiam ili kunis kaj ŝi povis aŭskulti la belajn pensojn kiujn li, regate de la inspiro, portis en si ; kaj mia poeto, iam li kapablis nur, pro tremiga feliĉo, ekstari sub la floranta magnolio, sub kiu ili unufoje interparolis, kaj vice kisi ĉiujn ĝiajn foliojn. Mi ja diris ke li estas juna kaj romantika poeto kaj lia karulino, bela blondina fieraj junulino. « Neniam bona finiĝo por tiuj du », vi certe opinius, estante duedeke jarojn pli aĝa ol nun. Kaj vere ankaŭ finiĝis malbone.

Iun vesperon la junulino iris for kaj ne revenis al la juna poeto. Kiam ĉi tiu atendis du-tri tagojn, io malrapide rompiĝis en li ; io griza kaj malluma ekkovris la sunon kaj profunda melankolio fiksiĝis en lia eno. Li rifuzis kredi ke la knabino definitive forlasis lin, kaj ankoraŭ multajn vesperojn li atendis ŝin je la horo, kiam ŝi kutime venis kvankam, en lia rondo, ĉiuj kapokusis kaj amike provis komprenigi ke necesas akcepti la penson ke li plej bone forgesu la junulinon. Tiam li rigardis ion foran kaj ridetis al gaja memoraĵo kaj, estante sola, li parolis por si mem dek mil vortojn kiel juna, romantika poeto, enamiginta al blondina knabino, povas trovi.

Sed tiam venis tagoj, en kiuj akra, rekta faldo malrapide gravurigis inter liaj okuloj kaj io amara liberigis en li. Li fariĝis silentema kaj retirigema kaj oni ne plu aŭdis iun vorton el lia buŝo, kiel malfacile ajn oni povas kredi tion de poeto. En lia rondo oni ekzorgis pri li kaj parolis severajn vortojn pri la junulino, kiu tiel malĝojigis la junulon tiel ke li preskaŭ tute pereis. Lia patro konsilis al li ke li lernu regi sin mem, tial ke homo ĉiam devas mastri doloron kaj ĝojon ; li kredis ke la knabino ne indas lian amon kaj provis konvinki lin ke li kontraŭstaru la tiranecon de sia koro, kiel decas al viro, eĉ al poeto, ĉar ja neniam taŭgas ke la koro estras la homon. Eĉ plej taŭgas ke oni sin tute liberigu de la stultaj inklinoj de la eta organo, kiu senutile tiom ĝenas la homon. Vere saĝaj vortoj por ĉiu alia ol enamiginta poeto, kiu ne povis forgesi.

Sed fine venis tago, kiam li ekmeditis tiujn vortojn patrajn. Jes, ĉe pli funda esploro, li devis koncedi ke ne estus tiel stulte se oni povus deskuil ĉian sentemon kaj senigi sin de koro, pro kiu oni entute spertis nur multajn ĝenon kaj embarason. Konsidere al ĉio, estus eble bona solvo, se li povus tute forgesi la amatinon kaj senribele akcepti la penson resti sola.

Tiam li, iun vesperon, forlasis la hejmon kaj de pordo al pordo ekprezentis sian koron, la koron kiun li volis doni for por perdi la suferon de la amo kaj de la memoro. Dio pardonu ke mi kladis pri poeto, sed tion la junulino atingis ke li preferis vivi sen koro ol ĝenate de sia granda sufero. Sed nun, rimarkinde montriĝis ke al ĉiuj homoj, kiujn li alparolis, ja pli ol sufiĉis la propra koro kaj ke absolute neniu pretis krom-akcepti la ĝenon de dua. Estis eĉ iuj, kiuj kun plezuro cedus la propran koron, se por ĝi ili trovus amatoron. Senkuraĝiginte kaj laca hejmenirante li aŭdis pri ŝakristo, kiu ĉion akceptis, ankaŭ la plej sensignifajn kaj senvalorajn aĵojn, por monigi ilin. Tuj ekstaris la poeto kaj iris al li « Kredeble iu, kiu vivas komercante superfluaĵojn, volonte akceptos mian koron », li pensis. Jen ja naŭva, enamiginta kaj lunatika poeto !

Estis malriĉa, maljuna judo, kaj neniel li estis afabla, kiam malgaj-miena juna viro finvenis ĉe li kun sia stranga ofertaĵo — kiom ajn li kutimis negoci la plej strangajn aĵojn kaj monigi ilin. « Kion mi, mizerulo, faru per koro ? » li grumbliis. « Prefere alportu antikvajn juvelojn aŭ donu vian oran horloĝon, sed al tio vi certe pli kroĉas ol al tiu stulta junula koro, kiu probable taŭgas nur por

aspiri ĉiajn sensencaĵojn ! » Sed jen li subite ekpensis ke per tiu koro estas eble farebla komerco ; kiu scias ĉu ne estas iu aŭ alia, preta doni iom da mono interŝange de homokoro ? Tial li respondis ke pro nura boneco li ja volis konservi ĝin, ĝis li trovos solvon. Tiel la poeto lasis sian koron ĉe la ŝakristo kaj hejmen li reiris, nekompreneble pli malĝoja kaj sola ol iam li sentis sin.

Nun vi ja pensas en vi mem, kia malmola kaj sinama junulino ja ŝi, tial ke ŝi tiel senkore kaj frivole ludis per la amo de poeto ! Sed tiam vi forgesas kiom maloftas tiuj, kiuj komprenas kio estas ami kaj kiel abundo de delico iam igas la homo stulta kaj malŝparema. Mi dirus : se estas iu, kiun vi amas, iru, rapidu al li kaj diru al li ion ĝentilan ; eble morgaŭ ja malfruos !

Kiel ajn, ree hejme sen koro, la poeto fariĝis homo ŝajne tute alia. Kune kun sia koro li ja perdis sian poetecon kaj igis kia ĉiu alia homo — jen vere la plej peza kio povas okazi al poeto ! — kaj en li postrestis nenio de la antaŭaj gajaj ravoĵ, kiuj fariis lian vivon kontinua ĝojo kaj belo-festo. Kaj krome, kiuj antaŭe konis lin, rimarkis ke li fariĝis nekompreneble malmilda kaj amara viro, sententa tia, kiaj senkoraj homoj kutime fariĝas. Kaj fine venis tago, kiam li silente retirigis en sian loĝejon kaj pala kaj kvietaj enlitigis. Kaj en lia medio, oni ree kapskuis pri la strangaj kaj nekompreneblaj vojoj poetaj.

Nu, okazis ke la ŝakristo eliris por siavice vendi la koron de la poeto, sed ankaŭ li baldaŭ spertis kia stranga varo estas tia homokoro. Montriĝis ke ĉiu estis abunde provizita per tiu artiklo kaj ke multaj pretus ŝanĝi sian propran koron kontraŭ io pli utila al io. Kio donas pli da plezuro ol io embarasa, sintruda kia koro kiu, nekontenta pri sia kutima destino, ja tro ofte volas esti pli ol simpla, bone funkcia organo kaj ofte, en la plej maloportunaj momentoj, ĝenas la homon.

Kaj finfine li intencis tutsimple reporti la nevendeban koron al ĝia antaŭa posedanto, kiam li ekaŭdis pri juna virino kiu, onidire, estis senkora junulino, virino sen koro. — « Eble ŝi emos akiri koron », li pensis, kaj tuj li ekiris oferti la koron de la poeto al ŝi. Li neniel povis supozi ke ĝuste tiu koro iam plenis de la junulino, al kiu li ekiris vendi ĝin.

Nu, li trafis ŝin en unu el siaj apatiaj momentoj, dum ŝi okupis sin repensante pri ĉiuj, kiujn malfeliĉigis ŝiaj frivoilo kaj malfidelo kaj ŝi taksis kiel, konsidere al ĉio, ŝia vivo restis malplena kaj malgaja. Tiam la judo, kiu havis vendotan koron, venis ĉe ŝi.

« Tiel, diris la blondina, bela junulino, oni rakontas ke mi ne havas koron. Nu, eble tio ne tute malveras. Mi ja volas foje sperti kiel estas, kiam oni ja posedas koron ! » Kaj ŝi akceptis la varman batantan koron de la poeto.

Kaj kiam ŝi portis en la busto tiun junan koron, subite vekigis en ŝi aspiro al la viro, kiun ŝi iam amis tiel sindone ; en ŝi liberigis profunda pento pri la frivolo per kiu ŝi traktis la poeton kaj ŝi ege deziris reveni lin. Ŝi firme kredis ke baldaŭ revenos li kaj de tiam brulis tage kaj nokte multaj lampoj je la horo, kiam la poeto ree enpaŝos sian domon. — « Plej kara, li dirus, la nokto estas for, jen la printempo kaj la suno floras sur la tero ; ni forgesu la pasintajn tagojn ; ni kantante surpaŝu la paŝtejon kaj brakosvinge dancu inter la primoloj ! » Tiam li kaptus ŝin en siaj junaj, fortaj brakoj kaj la delico de la antaŭaj tagoj vertiĝe ekregus ilin.

Sed venis la poeto ne ; la floroj velkis en ŝia ĉambro kaj unu post la alia, la lampoj estingiĝis. Tiam ŝi iun vesperon ekstaris kaj iris al li ; la deziro al li ege rapidigis sian koron kaj, kiel en revo, ŝi iris al la domo, kie li certe atendadis ŝin de multaj tagoj.

Sed kiam ŝi eniris la ĉambron, kie li kutime restadis, kvazaŭ fulmo trabatis ŝin. Blanka kaj malvarma, la poeto atendis la ĉerkon kaj lian buŝon ĉirkaŭis senlime-malgaja rideto, la laca rideto de tiu, kiu mortis pro sia ega deziro. Aŭ ŝajne ne eblis al la poeto vivi sen koro, kiel al tiom da aliaj homoj. Mi ne scias. Poetoj iam estas pene sondeblaj. Sed mi kredas ke estas bone neniam koleri poeton, eĉ se ŝajnas ke li ne havas koron.

Sed tio, karaĵ junaj amikoj, fakte celis esti rakonto sen moralo.

(El « Vertelsels in Juni »)

Kun afabla permeso de la eldonejo « PRO ARTE », Diest.

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnestraat 38, Turnhout.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — *Afdeling Brugge* : Gedurende de afgelopen maand werden onze leden vergast op een voordracht gegeven door dhr *Vernimmen* over het ontstaan en de eigenlijke stichter van het *Ido*. De belangstelling voor het congres van *Gent* was groot onder de leden zodat met ongeduld naar de congresdag werd uitgezien. Er waren een 26-tal deelnemers, die allen om ter meest genoten hebben. De belangstelling is even groot voor het Internationaal Congres van 1950 te *Parijs*. Op 10 Juli jl. ontvingen wij een grote groep Franse Esperantisten uit *Rijsel, Tourkoje* en omstreken. De werkvergaderingen van de Donderdagavond gaan onverminderd voort. Onze leden *Iserentant* en *Michiels* maakten zich verdienstelijk met het opmaken en leiden van *Cerbo-Gymnastiko* wat zeer gesmaakt wordt. Enkele leden zijn naar *Helsingör* (Denemarken) geweest, anderen naar *Tjechoslowakije* en vier naar *Bournemouth*, zodat onze groep werkelijk deelneemt in de Esperanto-manifestaties.

V.E.B. — *Afdeling Brussel* : Op Zaterdag 15 October viert onze afdeling feest in de « Vlaamse Club », Em. Jacquainlaan 121, van 20 u. tot in de vroege uren van de daaropvolgende Zondag ! Onze vrienden uit Mechelen, Antwerpen, Aalst en van elders worden hierbij van harte uitgenodigd !

Op Dinsdag 4 October, steeds in de « Vlaamse Club » en ingeselligs te 19.30 u. : Esperanto-proefles volgens de Cseh-Methode.

Voor Juli 1950 ligt een 12-daagse reis per toerauto in het verschieft naar de « Esperantistaj Ferioj » te Kufstein (Oostenrijks Tirol) langs de boorden van de Rijn en Ober-Beieren. De reis is alleen bedoeld voor leden van de V.E.B. Belangstellenden kunnen zich nu reeds melden bij de voorzitter (E. Cortvriendt, P van Humbeekstr. 3, Brussel-West). Nog vóór nieuwjaar ontvangen ze het uitgewerkte reisplan en de nodige inlichtingen. Nu reeds kan voor de reis worden gespaard door stortingen of overschrijvingen op postrekening 408616 van Vlaamse Esperantistenbond, Afdeling Brussel. Op de strook vermelden : voor reis naar Tirol.

V.E.B. — *Afdeling Gent* : Niettegenstaande de verlofperiode, schonk de opkomst onzer leden op de vergaderingen telkens voldoende. Op 10-8 ; vertelde R. De Schepper over zijn reis naar Engeland en over wat hij bijwoonde. Op 17-8 hoorden wij het wederavaren van dhr. *Vanneste* op het wereldcongres te *Bournemouth* en vernamen zijne indrukken over deze Esperanto-hoogdagen. — Op

24-8 hadden wij het genoeg een spreekbeurt van de Zweedse Kunstschilder *Hans Abrahamson* uit *Norrköping* te genieten ; deze voordracht werd door de B.N.R.O. Gent aangekondigd. Op 6-9 gaf onze ijverige ondervoorzitter G. De Boes een causerie met overvloedige en interessante citaten over de Esperanto-humorist R. Schwarz. Alle leden en vrienden van de V.E.B. zijn steeds welkom op onze wekelijkse vergaderingen van de Woensdagavond.

V.E.B. — *Afdeling Mechelen* : Onze reis naar Denemarken heeft gewis bijgedragen het aantal leden en belangstellenden voor Esperanto in het Mechelse te verhogen. Wij voorzien dus dat wij buiten de cursus welke plaats vindt in het kader van de stedelijke avondlezingen, een bijkomende cursus zal ingericht worden door de afdeling. Alhoewel het eigenlijke nieuwe cursusjaar nog geen aanvang nam, kwamen de Mechelaars regelmatig bijeen in hun nieuw, doch waarschijnlijk voorlopig lokaal : ROYAL, Grote Markt, en dit iedere Woensdag van 20 u. tot 22.30 u. Dienen vermeld, een uitstapje naar Hofstade en een uitstap naar Brugge waar de Mechelaars zich verbroederden op 11-9 met de Brugse deelnemers aan de trip naar Denemarken. Op een der laatste vergaderingen werd het programma voor de eerstkomende 3 maanden vastgelegd. Ziehier wat in Oktober zal plaats vinden :

5-10 : oplossing enigmojen enz. ; 10-10 : bestuurskiezing, goedkeuring van statuut vaststelling der afdelingsbijdrage enz. ; 19-10 : « de accusatief en Esperanto » — Nederlandse spreekbeurt door Dr. Van Gindertaelen ; 26-10 : zangavond onder leiding van Dhr. Van Peteghem. Iedere avond wordt er aan conversatie- en grammatikale oefeningen gedaan. De Stadscurso onder leiding van Juffr. Van de Werf begint op Woensdag 5-10-e.k. en gaat door iedere Woensdag en Vrijdag vanaf 19 u. tot 20.30 u. — de leergang gaat door in de Zuidschool — Louisastraat. Men schreef in op 30-9 e.k. tussen 7 en 8 uur en op de eerste lessen.

V.E.B. — *Afdeling Oostende* : Er was weinig belangstelling voor de eerste vergadering van het nieuwe seizoen. De inrichting van onze wintercursussen (waaronder nl. een Cseh-cursus) werd besproken. De aanvang van werd bepaald op einde Oktober en er zal een degelijke propaganda gevoerd worden. Er werd ook een spaarkas ingericht voor ons kerstfeest onder het beheer van Mevr. *Vanneste*. De leden worden dringend verzocht de vergaderingen regelmatig bij te wonen bijzonder met het oog op de voorbereiding van het V.E.B. congres 1950.